



# PENSEO

N-ro 368

Jun. / 2022

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Tiberio Madonna (Italio)



### Trans la tempo

Mi estas vivanta  
 pluan vivon  
 strangan  
 ekster la tempo.  
 Mi estas kaŝrigardanta  
 sen permeso  
 tra la truo de seruro  
 kiam ĉio estas finiĝinta  
 kaj mi vidas  
 kio okazas  
 trans la limo  
 post  
 la frapo fatala  
 mi vidas tion  
 kio ne estas por mi,  
 mi sentas tiel.  
 Kion mi faras?  
 Kion mi faras ĉi tie  
 ankoraŭ ĉi tie?  
 La filmo finiĝis  
 la kinejo malplenas  
 kial mi  
 troviĝas ankoraŭ  
 en la ludo  
 kiu ja fine estas  
 de fremdaj bildoj?  
 Tamen  
 ĉi tie mi restas  
 trans la tempo  
 mergite  
 en la nenion

kiu daŭrigas flui  
sed ne apartenas al mi.

### La panoramo

La panoramo sen suno.  
 Malbela.  
 Eĉ se ĝi estus bela  
 ĝi estus malbela.  
 La panoramo kun suno.  
 Bela.  
 Kvankam ĝi estas bela  
 ĝi estas malbela  
 la panoramo sen amo.

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### Feliĉan naskiĝtagon, Flavja!

Malgraŭ merito nenia,  
 mi gajnis luman premion:  
 anĝela filino alvenis  
 por lernigi al mi dolĉecon:  
 senfinan amon al ĉiuj!

*Juiz de Fora, 18/05/2022.*

## Moissey Bronshteyn (Rusio)



### Montrante familian albumon al la gaste-oficiro

Ĉu vin kaptas ia tristo tenera,  
 ne, ne amo, – estas io alia,  
 kiam montras vi ĉe lampo vespera  
 flavajn fotojn en album' familia?

Min ja jes. Jen mia avo – sen mon', do  
idojn tamen produktinta kun fajno:  
sep gefiloj liaj venis en mondon!  
... Ĉiuj sep suferis en militfajro.

La avinjo – jen, grizhara, en lito...  
Jam malsana, jes, okdekjarulino.  
En Taŝkent' ŝi restis dum la milito  
por priplori kaj atendi. Ĝis fino.

Tiu estas la plej aĝa onklino,  
kiel panjo – belvizaĝa kaj svelta...  
La unuan trovis ŝin la mortfino  
en fornego de l' horora Oswiecim.

Jen aliaj tri – tre ĉarmaj, endance...  
Dum bombado teren falis, vunditaj.  
Inter ili – mia panjo. Bonŝance  
nur brultuŝis ilin fajroj militaj.

Plej bonŝance ja por mia patrino,  
ĉar hazarde, inter sanga homkaĉo  
la knabinojn trenis for, al ravino,  
brulvundita viro, jen do – la paĉjo.

Tiu dando? Jes, la onkl'. Ne en banko.  
Li spertiĝis pri labor' kun juveloj...  
Sed forbrulis batalante, en tanko,  
dum kolegoj zorgis pri siaj feloj.

Honorigon lian por batalardo,  
por glorago, heroaĵo kulmina, -  
la ordenon de la Ruĝa Standardo  
prenis panjo nur en la sesdek kvina.

Jen alia - fortegul', kiel bovo!  
Forĝis feron li, hufumis ĉevalojn...  
perdis brakon apud fora Harkovo,  
sed ricevis (vidu jen!) du medalojn.

Jen la lasta – prudentulo diketa,  
kolonelo, ĝisirinta Berlinon,  
eksigita pro l' ordono hebeta  
postmilite. Kaj pafinta la sinon.

Ruĝa sun' subiras nuben kun vento –  
morgaŭ, eble, ne tre bonos vetero...  
Mi, naskita post kaj dank' al la Venko,  
kvazaŭ vidis la militon en vero.

Mi malamas ĝin... Ja multaj la saman  
sorton havis, ankaŭ la familion...  
Jes, vi estas militisto, kaj tamen -  
ĉu vi volas ke mi ŝatu militon?

21.02.2005

\* \* \*

Al la poema muldo  
aliras mi kun mildo,  
ĝi estas mia ŝildo  
kontraŭ hazarda ŝuldo –

por ke ne venu mordo  
de kritikista merdo,  
kaj ne okazu perdo  
pro malŝlosita pordo.

Jen estas firma kerno  
de l'poezia karno -  
eĉ la plej eta larmo  
utilas ja por lerno.

Nu, mi ne estas lordo  
revanta nur pri lardo,  
do eĉ la pensa tardo  
ne estas grava tordo.

Se el varmega sablo  
aŭdiĝas kruda siblo,  
min ĉiu nerva fibro  
direktas nur al fablo.

Grateto kontraŭ verto  
pensigas min pri virto,  
sed mi plu restas vir', do  
ekscitas min la verdo.

For la enua virgo  
eĉ se minacu vergo!

Se tentas manon lir' do  
mi ludu ĝin kun lerto.

## Rita Mkrtchyan (Armenio)



Disdonas li poemojn siajn,  
Kiel ludiloj, bagateloj,  
Disdonas larmojn de feliĉo,  
Pri bonaj tagoj siajn revojn.

Disdonas li la varmon sian,  
Kiel la perloj, ne por ĉiuj bezonate,  
Sed pensas, eble iam, iam,  
Anim' ekĝojos pro la sent' konata.

Nenion kostas vortoj bonaj,  
Sendorma nokto, kvieteco,  
La bril' de steloj, la triumfo,  
Kaj renkontiĝo kun soleco!

## “Verda” vilaĝo

— Ĉu fabelo, aŭ vero? —

En unu granda lando estis la vilaĝo, kiu havis la nomon “Verda”.

Pri vilaĝo ĉiuj multe rakontadis, invitis viziti kaj enloĝiĝi, ĉar ĝi vere estis kaj verda (pro belegaj ĝardenetoj), kaj sunplena, ankaŭ pro varma interrilato de la loĝantoj.

Kompreneble, ne ĉio estis sennebule, sed, ĝenerale, vilaĝanoj estis amikemaj kaj bonkoraj.

Ili havis revon iam trovi sorĉajn semojn por la ĝardeno.

Oni diradis, ke plantitaj semoj kreskos, kaj en unu belega tago aperos la ĝardeno kun la arboj, kiuj donos magiajn fruktojn tutan jaron.

Kaj krom manĝaĵo, la fruktoj donacos sanon kaj feliĉon al la homoj.

Tute neatendite en unu suna tago aperis uragano kaj pluvego.

Post terura okazaĵo, multaj homoj restis sen la domoj, sen ĉio.

Sed ne nur tio estis tragedio por “Verda” vilaĝo, tragedio “aperis”, kiam la loĝantoj komencis konfliktadi unu kun alia, kulpigi ĉiujn en okazaĵo, eĉ komencis apartiĝi kaj diri, ke necesas forigi multajn loĝantojn el la “Verda” vilaĝo.

Kvereloj daŭris longe, ne helpis eĉ tio, ke multaj loĝantoj akceptis en siajn domojn tiujn, kiuj restis sen la domo.

En la koroj de ĉiuj loĝantoj aperis malpaco kaj malkontento.

Post la tempo, ĉiuj forlasis amatan vilaĝon kaj forveturis.

Pasis jaro, eble iomete pli, kiam unu vaganto, kiu foe-refoje vizitis faman vilaĝon, alvenis, sed ekvidis preskaŭ dezerton.

Restis nur kelkaj domoj kaj seka tero.

La vaganto eksidis sur la tero kaj malgaje malfermis sian saketon.

Tie estis sorĉaj semoj, kiujn li finfine trovis por transdoni al la loĝantoj.

Semoj, kiuj jam ne estis bezonataj.

## Ángel Arquillos (Hispanio)



Santosh Dhamala

Se vi trovas la pordon de la dia ĉielo,  
Avertu min, amiko, mi havas la ŝlosilon,  
Ne dubu, ne hezitu,  
Tie troviĝas Dio kaj miljardo da anĝeloj,  
Oazoj, paradizoj kaj niaj geparencoj,  
Sanktuloj el la tero,  
Homoj el ĉiuj rasoj kaj malsimilaj kredoj.

Dio kreis la mondon, sed baldaŭ la  
Homaro forgesis sian devon.  
Amiko, se vi trovas la pordon de l'ĉielo,  
Mi havas la ŝlosilon.  
Avertu min pri tio.  
La mondo min ja puŝis

Al dia paradizo.



## Yohanes Manhitu (Indonezio)



### LONGA DORMO

Kiu ne deziras agrablan dormon  
kiam la korpo kaj la menso laciĝas kaj esperas  
ripozon?

Malgraŭ esti vere diligentaj kaj tre laboremaj,  
ni estas homoj, nek maŝinoj nek robotoj.

Sed plurfoje ni obeas kaj sekvas  
ĉiun deziron, kiu lacigas la korpon kaj la  
menson

ĉar ni ĉiam serĉas por trovi,  
kvankam kiam ni trovas, ni perdas.

Ni trovas, ni perdas; ni trovas kaj perdas.  
Ni perdas, ni serĉas; ni perdas kaj serĉas.  
Ni donas kaj ricevas, ni donas kaj esperas  
ricevi.

Ni ricevas, ni ĝojas; ni ĝojas ricevi.

Longa dormo: vitamino por la korpo kaj la  
menso

por ke ili trovu povon entrepreni laboron.

Sed kiam la kokoj kaj aŭgurbirdoj kantas,  
vi lasas la liton kaj demetas litkovrilon.

*Noemuti, Okcidenta Timoro, aprile 2011*

### Malgranda folio

Inter la multaj folioj de la arboj  
kreskantaj en Via ĝardeno,  
estas mi, malgranda folio,  
kiun Vi gardas kun amo  
kaj Vi donas al ĝi koloron  
por ke ĝi havu veran formon.  
Tage kaj nokte Vi gardas ĝin  
kvankam ĝi estas nur folio

en Via ĝardeno tro granda.  
Estas tre felice vivi ĉi tie  
en la spaco nomata mondo  
kiun oni konsideras paradizo.

*Yogyakarta, 25/VIII/2007*

## Jadranka Miric (Serbio)



### PLUVODORO

Post aprila pluvo  
nova tag' odoras je pluvo.  
kvankam suno anonciĝas  
ĉiuj pluvgutoj tuj vaporigigas!

La pluvodoro de la aero  
malsamas de odoro de la tero!  
Malsamas ankaŭ daŭra pluvoensorbado  
de la tero  
ol surstrata marĉetoj pro ilia tuja  
malapero!

La seka tero odoras je polvo.  
Sur la polvoplana strato  
gaje baniĝas la paseroj.  
Scivole ilin rigardas la nigra kato.

### Vespera malbutonumado

Pluvogutoj batas  
en l sama sonoritmo.  
Niaj spiritoj harmonias,  
eĉ murhorloĝo samritme tiktakas.

La ruĝa rozbukedo en la vazo .  
La tuta ĉambro bonodoras.  
Vi ŝin forte sed tenere brakumas  
kaj kisas.  
Tio bonas por amobazo!.

Morgaŭ aperos suno.  
Ekestos varmo , lumo kaj espero!  
Kiam flavulo nomata Luno

eniros kaŝe, en vian domon, iĝos  
vespero!

La ĝusta tempo por la amo!

## Estas tagej per amo

Ekfloris violaj krokusoj,  
belaj kaj flavaj narcisoj.  
La galantoj en la manoj de belulin'  
salutas per kliniĝinta kapo vin !

Flavaj narcisoj oriĝas  
kiel via hararo je suno.  
Sur la benko sen akvo ili velikiĝos  
antaŭ la apero de luno.

Tiel mi, kara mia,  
sen via rido kaj dolĉa kiso  
malsaniĝos antaŭ la rozoflorado.  
Kisu min, mi ne timas de miela kisado.

### Ivanichka Magharova (Bulgario)



Stelo deŝiru  
el ĉielo kaj kaŝu  
ĝin en la koro!

Glaskoj malplenaj  
trinkis mi amarvinon.  
Anĝeloj kantas.

Trompet' vastaĵon  
voĉplenigas. Birdoj  
en arbar' mutas.

Mildaj manplatoj—  
Ĉirkaŭprenado de infan'  
En stel' — okuloj.

Aŭtuna trompet'  
Sur la kampo malĝojas.

Oriol' ĝemas.

Kvarmanegulo.  
Amiko de la homoj.  
Ĉiam fidela.

Korn' sonplenigas  
arbaron. Ravitecaj  
birdoj. Tagiĝas.

### Elena Popova (Bulgario)



## LA VIVO ESTAS...

Voj' estas la vivo  
kun korp' vundita.  
Ofte vojkrucado  
pri nia elekto,  
Kien?  
Font' en la monto  
pri gluto da akvo.  
Postsignoj de ni,  
ne tralegitaj.  
Kiam?  
Libroj legitaj  
kaj forgesitaj,  
sed niaj gvidantoj  
je voj' malfacila.  
Kiel?  
Per sana spirito  
al voj' senfinita.

## La mirakla papilio

Freŝa roza floro  
dum matena horo  
allogis intereson  
en vivul' neforgesa.  
Ĝi polvigis sukcese  
la florojn silente.  
Ne atendu mielon—  
elflugis al ĉielo.  
Nur belecon portas

la papili' senmorta.



## Kiu timas de februaro?

Vidu kiel ludas  
feliĉa la petolul',  
de kristaloj kaj perloj  
riĉa skulptemul'!  
Kiel ridas kaj ploras  
sola kun vento  
sur neĝa lulil',  
plektita talente.  
Amuziĝu dum Februar' —  
la frosta fil' de la jar'!...

\*\* \*\* \* \* \*

## Morgaŭ estos pli bona

Leĝere frapu vian dormantan animon,  
kaj malfermu viajn okulojn lante.  
Rigardu la multokupitan mondon,  
ĉu ĝi ankoraŭ senĉese turniĝas sole.

Printempa zefiro ne konas moron,  
sed blovas en la junan koron.  
La larmsigno sur hieraŭa vizaĝo  
sekiĝos kune kun la memoro.

Ni serĉas supre de ĉielo flugilojn,  
migrantaj birdoj lasas spurojn.  
De malproksimaĵo alportiĝas mesaĝo  
pri malsatego kaj senkora militfajro.

Blanka neĝo sur la monto flirtas,  
koroj de junuloj flamiĝas.  
El sincereco fariĝu muziknotoj  
kun la beno al malproksimumoj.

Kiu povus ignori sian hejmlandon,  
kaj neglekti infanecon memorindan?  
Kiu povus toleri hieraŭan aflikton

forporti nian mienon ridantan?

Juneco ne komprenas rutinon oldan,  
ruĝa ŝminko infektiĝas kun polvo.  
Lasu larmon delonge ne viditan  
humidigi vian vizaĝon!

Sunleviĝo vekas frumatenon,  
vasta tero reprenas sian brilon.  
Kun la sono de milda vento  
komponiĝas la muziko de la vivo.

Vian entuziasmon kantu,  
viajn manojn etendu!  
Mi brakumu vian songon,  
kaj havu vian sinceran vizaĝon!

Nia rido pleniĝu de la fiero juneca!  
Al morgaŭ dediĉiĝu preĝo sincera!  
Ni esperu, ke morgaŭ estos pli bona!

## Delonge olda tempo

Ĉu oni rajtas forgesi oldan konaton,  
Kaj ne plu rememori entute?  
Ĉu oni rajtas forgesi oldan konaton,  
Kaj la tempon oldan delonge?

Vi certe havos egan kruĉon vian,  
Kaj mi sekve havos la mian.  
Ni drinku ankoraŭ kune je amikeco,  
Pro la delonge olda tempo.

Ni ambaŭ trans la montetoj kuris,  
Kaj restis apud belaj lekantoj.  
Sed ni kun lacaj paŝoj migris,  
Depost la delonge oldaj tagoj.

Ni ambaŭ en la rivero remis,  
De mateno ĝis sunsubiro.  
Sed vastaj maroj inter ni ondis,  
Depost la delonge olda tempo.

Jen mia mano, amiko fidela,

Kaj donu al ni vian manon!  
Ni drinku bonvolan gluton,  
Pro la tempo delonge olda.

Ĥoro:  
Pro la olda tempo, mia kara,  
Pro la tempo delonge olda.  
Ni drinku kune je afableco,  
Pro la delonge olda tempo!

*“Auld Lang Syne” by Robert Burns,*

*Elĉinigis*



**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**



**Mimoza Ahmeti**



**La plej briletanta viva vizaĝo**

Neatendite alvenis  
Kvazaŭ donaco meze de malespero  
Nekredebla feliĉo kun krioj  
La briletado,  
Radianta falo, reveno  
Al la senso en detalo  
Kaj tiom freŝa  
La ĉelo, poste la histo...  
Vivu, ŝajnis al mi diri...la rigardo.  
Mi alpaŝis kaj eliris  
El la mortoombro.  
Alpaŝis mi denove kaj vidis ree  
Ke mi eniris en la viva hejmo.  
Bela infano, alparolis mi, al la vizaĝo  
Steleca, ne enamiĝu al mi  
Mi ja fantomo estas  
Vi estas anĝelo, li diris-  
Kaj min per kisoj atakis  
Infanecaj

Kvazaŭ kun la universaj briletoj.

Verda estis la blua skuado  
De la blanka limfo,  
La malfunkciantaj hormonoj ekiradis.  
La vizaĝo profundajn petalajn kolorojn  
donadis,  
Mi kantis, sonojn eligis  
Kies signifo en la akustiko de la feliĉo  
troviĝis.

Estis tagoj alfiksitaĵoj al ideo,  
El la plej belaj tiaj tagoj,  
Plenigitaj per vokalaj ondoj en obtuzitaj  
konsonadoj,  
Kadencoj kaj dekadencoj  
Aktiviĝis je plezuro  
En mirinda muzika performado,  
Mi kantis, je unuafoje en la vivo  
La cerbo sian muzikon donis  
Kaj la mistiko kara kiel stelo fariĝis.  
Mi ne havis talenton por fari  
Eventojn, aktojn aŭ homajn gestojn  
Krom pligrandigojn de la ondoj de la  
senfino  
Kaj eble tute kredis tion, kio okazadis  
Ne volante pravi ĝin,  
La deziro fluis nur por ke ne tio finiĝu,  
Ĝiskiam el la vizaĝo briletanta, iun  
vesperon  
Mi vidis mizeran rojon je cinismo,  
Kiu enverŝiĝis por estingi mian soifon,  
  
El kiu mi neniam akceptis trinki  
Kaj la likvaĵo de liaj okuloj estis sekiĝinta  
Estis solvita,  
Kiu scias kia malseka meduzo  
Estis ĝin suĉinta dum la tago.  
Mi foriris kun la plej nova pentraĵo  
En la mia menso  
De la junula vizaĝo, briletanta senokula.  
Ekde tiam mi ne scias kial mi vagadas  
En la viva loĝejo.

## La fekundiĝo de la floroj

Estis etulo kiel la lumo  
Kun la okuloj kiel la nokto  
La tuta- stelo.

Haltis li antaŭ la miaj abismoj,  
Surprizita kriis:  
Sinjorino, vi enfalas!

Mi scias, mia rigardo susuris,  
Kaj per miaj brakoj envolvis  
Lian laktecan kison samkiel lian virinon—  
Tiom li povis donaci por ke savu min.

Tutan tagon li florojn fekondis  
Kaj vespere, kiam la steloj lin pinĉis  
Kuradis, kriadis:  
Sinjorino! Vi estas mortante, vi estas  
enabismiĝante!  
Kaj denove lakteca kiso.

Ambaŭ ni estis dispecigitaj:  
La kisojn kun la serpentoj promesitaj  
Kaj la ĉirkaŭprenojn kun la lupoj  
Ni ne sukcesis fari.

Ni donis kelkajn kisojn kun la kadukitaj  
kolubroj  
Kiu post unu tago kuracigaj fariĝis.  
La rapidecon de la kuglo fronte de la abismo mi  
sentis  
Kaj la nekapteblan senŝeliĝon disde la  
kartoĉo...

Iru, mia etulo, ne pliigu mian solecon  
Per via baraktado por savi min,  
Vidu kiel lekas la laktecajn lipojn, la  
malfortuloj,  
Avidante nin..

Mi scias: vi ploros pri mi per la elkoraj larmoj  
Kaj uzos vian virilon kiel ponardon  
Por enigi ĝin en la ventron

De tiuj kiuj mokas la baraktadon.

Kaj en mia renverso mi vidos kvazaŭ en la  
songo  
La fekundiĝon de la floroj.  
Kaj estos por vi la plej Bela de la Paradizo  
Kiel mi estis ankaŭ la plej bela de la infero.  
*Elalbanigis*



**Bardhyl Selimi**  
(Albanio)

## El Ĉina Antikva Poezio

**Zhang Yuangan (1091-1170)**

—laŭ melodio *Lanta kanto de Shizhou*

Fluganta griznubo en aŭtunpluvego  
panike disigas monedojn ĉe krepuskespero,  
kaj flirtas kun lun' en malvarma aero.  
Vualas nebulo salikojn per svaga blank-tego.

Vagantaj lampiroj jen kaj jen trembrilas,  
Boatoj kun velo driv-glitas sub nokta  
ventpelo.  
Aŭdiĝas susuroj akvherbaj en trista malhelo.  
malklara lagakvo silk-tulon similas.

Post ol mi sobriĝas el song' aŭ ebrio,  
apogas min mi al la boatfenestro  
kaj trovas, ke jam la natura orkestro  
prezentas pejzaĝon per verda ario.

Ĉargen' min turmentas korŝire,  
jen Marso ekbrilas omene.  
Malicaj kortegoj dominas plenĝene,  
la trupoj de hunoj minacas rapire.

Mi volus konduki el ĉielrivero  
la akvon por lavi la teron klar-pure  
de sangomakuloj venĝ-ĵure,  
kaj ilin frakasi sen ajna tolero.



Sed kie troviĝas du imperiestroj ja nune?  
Tre urĝas la stato por nia nacio,  
ĉar nur apartigas rivero — akv-strio —  
de la malamiko apenaŭ rezisto-imune.

Pensante pri ili en fora dezerto,  
en kiu la hunoj agadas laŭvole,  
mi splenas kaj vane indignas enkore,  
kaj nure lamentas en mensa malcerto.

—*laŭ melodio Bonaŭgura perdriko*

Kiel flosantaj nuboj ŝanĝiĝemaj,  
merito, famo estas polv' en vento.  
Plej bonas drinki, ĝui ĝis kontento,  
kaj kanti ja per versoj la poemaj.

Vizias ni l' perditan teron vere,  
amaron ni samsortaj homoj kovas.  
En pluv' ne fali floroj ja ne povas,  
nun drinku ĝis ebrio ni prefere.

## Yue Fei (1103-1141)

—*laŭ melodio Riveo plenruĝa*

Hirtiĝas miaj haroj pro indigno.  
Ĉe l' balustrado  
rigardas mi kun digno  
post forta ŝtormpluvado  
al alta la ĉielo,  
kaj mi eligas longan vesuspiron.  
En mia brusto bolas sento de fidelo.  
Ignoras mi la polvsimilan famdeziron  
dum tridek jaroj mi batalis brave  
laŭlonge de la tero de patrio.  
Ne ĉesu ja mortigi hunojn glave,  
alie pentos vi kun hargriziĝo ĉe tempio.

La humiligo de patri-pere'  
ankoraŭ ne venĝitas vere,  
kaj hato de mi kiel generalo, ve,  
je kiu tago povos neniigi ja degele!  
Mi volas rajdi per milita ĉaro  
kaj prenos la pasejon de la Helan-monto.  
Dezirus manĝi mi la karnon de hunaro,  
ilian sangon trinki kun volonto.

Denove mi aranĝos en bonordo  
la montojn kaj riveroj de l'patrio  
kaj sendos bonnovajojn per raporto  
el la batalo, jen por nia dinastio!

—*laŭ melodio Malgranda montvico*

Lastnokte griloj ĉirpis ja senĉese  
kaj vekis min el sonĝ' pri rajdo sur ĉevalo,  
rapide galopante laŭ l' ebena vasta,  
profunde jam en noktomezo kun lunpalo.  
Mi ellitiĝis kaj paŝadis ĉirkaŭ la ŝtuparo,  
en la lunlum' nebule bril-flagranta.  
Silento regis tiam inter homa aro.

Mi klopodadas por la regno  
dum multaj jaroj ĝis nun mi  
ekhavas grizajn harojn ĉe tempi'.  
Bambuoj, pinoj en hejmloko  
jam ankaŭ maljuniĝas pli kaj pli,  
sed montoj baras al mi l' vojon  
reiri hejmen jen pro nostalgi'.  
Mi volas plektri la liuton  
por forludi splenojn de anksi',  
sed mankas konfidemaj aŭskultantoj.  
Se kordoj de l' liut' rompiĝus,  
do, kiu volus ja aŭskulti kun konsci'?

### Elĉinigis



## Veĵdo (Ĉinio)



## Wang Anshi (1021 - 1086)

### Ascendo al la Alfluginta Monto

Sur l' Alfluginta Monto l' turo altas je mil  
futoj,  
ĉe kokokrioj l' sun' aperas el la horizonto.  
Kaj mi ne timas tiujn nubojn antaŭe

flosantajn,  
ĉar mi nun staras sur la plejaltejo de la monto.

## Liu Ban (1023 - 1089)

### Sur lageto postpluva

La lageto da pluvakvo glatas kiel brila  
Spegulo sur kiu la kaban' inverse staras.  
De l' salikoj flirtetantaj en printempa vento  
centmil gutoj sur lotusojn helsonore falas.



## Cheng Hao (1032 - 1085)

### Improvizajo pri printempa tago

La brizo kaj nubetoj min ravas ĝistagmeze,  
Promenas inter floroj mi laŭ river' kompleze.  
Ĉi homoj mian ĝojon elkoran ne komprenas,  
Prenante min por bubo vaganta tre ekscese.

### Improvizajo pri ekskurso

Sur floraroma kampo mi laŭplaĉe ekskursadas,  
Printempo plene helverdigas forajn montojn  
ĉie.

Flirtantaj floroj min ekzaltas inter salikarboj,  
Mi pro laciĝo sidas sur muskplena bordo ie.

Ne nepre malakceptu la bonvolan  
drinkproponon,

Nu vidu: falas en la vent' petaloj elegie.  
Nun ke serenas tago, jen la Festo de Mortinto,  
Do ĝuu la plezuron ĝis vespero eŭforie.

## Liu Jisun (1033 - 1092)

### SURSKRIBO SUR LA EKRANO

Hirundoj pepas sur la traboj.  
Allogas ilin temoj kiaj?  
Min ili vekis el la songo

senĝena. Konus ja aliaj  
nenion, eĉ se mi klarigus  
la pepon. Do kun la vinkruĉo  
kaj irbastono, mi preferas  
ermiti monten nun por fuĝo.

### Elĉinigis



## Minosun (Ĉinio)



## Zhuangzi

### ĈAPITRO DUDEK-OKA

## La reĝoj, kiuj abdikas la tronon

### §28-08

Yuanxian, disĉiplo de Konfuceo, vivis en la regno Lu, kaj lia loĝejo estis tre malgranda kun pajla tegmento. La pordo, farita el plekitaj fragmitoj, estis truoplena kaj apenaŭ fermebla, kaj ĝiaj ĉarniroj estis faritaj el rompigitaj branĉoj de morusarbo. Unu senfunda vazego enfiksita en la muro, servis kiel fenestro, kaj kelkaj ĉifonoj, kiuj estis pendigitaj en la mezo, servis kiel septo, kiu dividis la dometon en du partetojn. La pluvo enlikiĝis tra la tegmento kaj la planko estis treege malseka. En tiu ĉi mizera domaĉo, Yuanxian, rekte sidante kun mieno dignoplena, ludis sian liuton kaj kantis.

Zigong, alia disĉiplo de Konfuceo, venis viziti Yuanxian. Li alveturis en granda kaleŝo tirata de alta ĉevalo. Li portis blankan superveston sur sia purpura jako. Ĉar la kaleŝo ne povis fari al si vojon en la mallarĝan strateton, Zigong devis piediri al la dometo. Aŭdinte la frapon sur la pordo, Yuanxian malfermis la pordon, portante eluzitan ĉapon kaj senkalkanumajn ŝuojn kaj sin apogante sur promenbastono.

Zigong estis treege surprizita, dirante:

“Ho, kian malsanon vi suferas?”

“Pardonon,” diris Yuanxian, “mi aŭdis, ke tiu, kiu havas nenian posedaĵon, estas rigardata kiel malriĉa, dum tiu, kiu ne povas meti en praktikon, kion li lernis, estas rigardata kiel malsana. Nun mi estas malriĉa, sed ne malsana.”

Ĉe tiuj ĉi vortoj, Zigong retroiris kelkajn paŝojn, kun granda honto sur la vizaĝo.

Yuanxian ekridetis kaj daŭrigis:

“Trovigās iuj, kiuj agas konforme al la mondaj konvencioj, amikiĝas kun homoj por formi klikon, studas diligente por ricevi alies laŭdojn, aŭ donas instruojn por paradi per siaj scioj. Trovigās eĉ iuj, kiuj faras malbonojn sub la masko de humaneco kaj justeco aŭ amas la elegantecon de altaj ĉevaloj kaj la pompecon de luksaj kaleŝoj. Jen la aferoj, kiujn mi, Yuanxian, neniam kaj neniel volas fari!”

#### §28-09

Zengzi loĝis en la regno Wei. Li portis vintran robon subŝtofitan per kanabovato, kun la ekstera flanko jam eluzita ĝis ĉifoniĝo. Lia vizaĝo ŝvelis; liaj manoj kaj piedoj estis kovritaj de dika kalo. Li vivis la vivon sen kuirado de nutraĵoj dum kelkaj tagoj kaj sen novaj vestoj dum dek jaroj. Se li provus reĝustigi sian ĉapon, la laĉoj rompiĝus. La plej malforta ektiro de la antaŭa parto de lia robo povus nudigi liajn kubutojn. Kiam li forte tirus siajn ŝuojn sur siajn piedojn, la kalkanumoj malfiksiĝus. Trenante siajn eluzitajn ŝuojn, li kantis la himnojn el la epoko Shang. Lia resonanta voĉo plenigis la ĉielon kaj la teron, kvazaŭ ĝi venus el ia muzikilo el bronzo kaj ŝtono. La reĝo malsukcesis fari lin sia ministro kaj la princoj malsukcesis amikiĝi kun li. El tio oni povas konkludi, ke tiu, kiu strebas al sia idealo, forgesas sian korpon; ke tiu, kiu penas konservi sian sanon, forgesas siajn profitojn kaj avantaĝojn; kaj ke tiu, kiu dediĉas sin al la Taŭo, forgesas sian menson.

#### §28-10

Konfuceo diris al sia disĉiplo Yan Hui:

“Hui, venu do min aŭskulti. Via familio estas malriĉa, via situacio estas malalta. Kial vi ne penas trovi por vi ian regnan oficon?”

“Mi havas nenian intencon fariĝi regna oficisto. Mi povas vivteni min per la greno produktita sur la 50-mua tero ekster la urbeto, kaj la alia 10-mua tero, kiun mi posedas en la urbeto, estas pli ol sufiĉa por la

plantado de kanaboj kaj la silkraŭpa bredado. Ludi liuton sufiĉas por min distri; mediti pri viaj instruoj sufiĉas por min plezurigi. Kion alian do mi povus postuli? Ja mi havas nenian intencon fariĝi regna oficisto.”

Profunde kortuŝita de tiuj ĉi vortoj, Konfuceo ŝanĝis sian vizaĝkoloron kaj prenis severan mienon, dirante:

“Bonega estas via ideo! Mi iam aŭdis: ‘Tiu, kiu estas kontenta pri tio, kion li havas, ne lacigas sin per alta pozicio kaj riĉeco; tiu, kiu vivas pacan kaj senzorgan vivon, ne maltrankvilas pri ĉia perdo; tiu, kiu persistas en la kulturado de sia menso, ne hontas pri sia malalta socia pozicio.’ Jam longe mi recitas tiujn ĉi parolojn, sed nur nun mi vere vidas en vi, kion ili signifas. Mi jam lernis ion de vi.”

#### Elĉinigris



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

## Ĉineske

### Yi Qiao (ĉino en Germanio)

#### Zefiro

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Zefiro  
blovas tenere  
en korojn kun sopiro.  
Ni pasios libere  
kaj laŭespere!

#### Vespera suno

— laŭ ĉinesko Aŭguristo\*\*

Vespera suno  
dolĉe trankvilas,  
sur ĉiel' de aŭtuno  
milde jubilas.

